V- 22487/1923

Dua Serio. — N° 20 (44). FONDITA EN 1915 Aŭg.-Sept. 1923.

# France-Esperanto

MONATA ORGANO DE FRANCAJ ESPERANTISTOJ — ORGANE MENSUEL DES ESPÉRANTISTES FRANÇAIS

ABONNEMENTS :
Étranger (Eksterl.) .......... Fr. 8.—
France .......................... Fr. 6.—
Unu numero : Fr. 0.75
Les abonnements partent du 1er Janvier.
La abonoj komenciĝas la 1-an de Januaro.

Rédaction et Administration :
51, RUE DE CLICHY, 51
PARIS (9e)

Manuskriptojn, kronikojn kaj sciigojn oni devas sendi al la redakcio antaŭ la 20-a de ĉiu monato. Ĝi rezervas al si la rajton korekti ilin. La manuskriptoj ne estas resendataj.

| TARIFO DE ANONCOJ | Unu jaro | 6 numeroj | 3 numeroj | 1 numero | « ANONCETOJ » |
|---|---|---|---|---|---|
| 1/2 paĝo | Fr. 105. » | 55. » | 35. » | 20. » | 1 frankon la linio. |
| 1/3 paĝo | » 70. » | 40. » | 25. » | 15. » | Dufoje : 0.75 la |
| 1/4 paĝo | » 55. » | 35. » | 20. » | 12.50 | linio. Trifoje : |
| 1/8 paĝo | » 30. » | 20. » | 15. » | 10. » | 0.60. |

*Envoyer tous chèques, mandats et lettres recommandées au nom personnel de*
*Sendi ĉiun monon kaj rekomenditajn leterojn nur al la nomo de*
M. F. de MÉNIL, 51, rue de Clichy, PARIS (9e)
Chèque postal :
PARIS (Ier Arrt) C. C. 8-60.

ENHAVO :

Al Francaj Esperantistoj. — Le XVe Congrès International Espérantiste à Nürnberg. — Letero de S-ro Prezidinto de la XV-a Kongreso. — S. F. P. E. — Franca Kroniko. — Tra la Esperanta Mondo. — Niaj Eĥoj. — Le Mouvement Espérantiste à l'Etranger. — Nia Gazetaro. — Nekrologo. — En « Verda Kato ». — A travers la Presse. — El la Franca Gazetaro. — Tribune des Groupes. — Bibliografio. — Annonces. — Liste des Groupes Espérantistes Français.

## Al Francaj Esperantistoj

*De la reapero de nia gazeto en Januaro 1922, la redakcio de* France-Esperanto *jam tre ofte babiladis kun niaj legantoj kaj abonantoj pri nia programo, tasko, planoj, projektoj. Ni konsideris ĉiam, ke la gazeto devas ekzisti por ili kaj per ili kaj ke nia legantaro apartenas al la redakcia familio.*

*Ĉu oni bezonas ankoraŭ ripeti la argumentojn pri la neceso de nacia esp. gazeto en Francujo, precipe nun, kiam blovas refortiga vento kaj la S. F. P. E. restariĝas kun novaj fortoj? Ni kredas, ke la evidenteco estas tia, ke pluaj argumentoj ne utilas. Des pli, ni konstatas kun bedaŭro, ke, post deknaŭmonata ekzistado,* France-Esperanto, *malgraŭ la aprob j kaj subtenoj, renkontitaj tre ofte, ne povis trovi ĝis nun solidan bazon por daŭra ekzistado.*

*Jen estas skemo de nia budĝeto por 11 numeroj de 8 paĝoj pojare.*

| | | |
|---|---|---|
| *1.000 ekz. de 1 numero kostas . .* | *Fr.* | *285* |
| *Korektoj, poŝtelspezoj, senpagaj dissendoj . . . . . . . . . . . . . .* | *»* | *60* |
| | *Fr.* | *345* |

*Do, 11 numeroj kostas 3.795 fr. La jarabono estas 6 fr., sed por multaj abonoj, sendataj pere de la Centra Librejo, ni pagas komisionon. Ni do prenu kiel mezan prezon 5 fr. Dividante per ĝi 3.975 fr., ni vidas, ke ni bezonas 759 aŭ pli ĝuste 800 abonantojn. Nun ni havas proksimume 500, el kiuj duono en Paris kaj la ĉirkaŭaĵo.*

*Ĉu ne estus pli interese havi nacian gazeton de 12 paĝoj ol federaciajn bultenetojn, kiuj tamen povas funkcii por konfidenciaj aferoj? La pligrandigo de nia formato ebligos al ni ankaŭ doni literaturan paĝon, nun mankantan kaj, tiamaniere, varii la enhavon.*

*Por tio ni bezonas aldoni 4 paĝojn, farante tiamaniere el nia revuo veran spegulon de nia movado en Francujo, unu numero kostos, entute, kun la elspezoj, 485 fr. Do, la jara budĝeto estos de 5.335 fr. Dividante ĝin per 5, ni havos la ciferon de 1.067 aŭ pli ĝuste 1.100 abonantojn.*

*Ni permesas atentigi, ke la gesam., laborantaj en la redakcio, faras tion senprofite kaj sindone.*

*Por garantii la ekziston de* France-Esperanto

*la federacioj devos siaflanke alporti al ni abonojn de siaj membroj. Por propagandaj kunvenoj ni povos konsenti vendadon de niaj numeroj kun rabato de 20 %.*

*Ĉu efektive estas tiel malfacile aboni la nacian gazeton? Ju pli multnombraj estos la abonantoj, des pli varia estos la enhavo kaj pli ampleksa la volumo de nia organo.*

*Jam la Parisa Federacio enskribis en la programon de sia oktobra kunveno la problemon pri* France-Esperanto. *Ke ĉiuj federacioj kaj grupoj bonvolu fari la samon. Ni estos tre kontentaj scii la opiniojn de niaj legantoj.*

*Se ni ne sukcesus trovi tiun apogon (ni ne kredas tian hipotezon), ni estus kun granda bedaŭro devigataj adiaŭi kun niaj legantoj je la fino de la jaro, post du jaroj de laboro, en kiu, sen iu ajn rekompenco, ni metis nian tutan energion kaj sindonemon.*

*Ni ne kredas, ke la francaj samideanoj permesos tion, kaj ni firme opinias, ke troviĝos en nia lando 1.000 personoj por garantii la ekzistadon de nia gazeto.*

*LA REDAKCIO.*

# Le XV^e Congrès International Espérantiste à Nürnberg

Le XV^e Congrès International Espérantiste s'est tenu à Nürnberg du 2 au 9 Août, sous la présidence du Professeur Dietterle, de Leipzig, en présence de 3.000 congressistes de 43 pays. Les espérantistes Français et Belges se sont abstenus d'une participation au Congrès. Les gouvernements d'Allemagne, de Bulgarie, d'Italie, de Finlande, de Lithuanie, de Yougo-Slavie, des Pays-Bas, de Roumanie, de Tchéco-Slovaquie, ainsi que la Croix-Rouge Internationale et la Municipalité de Nürnberg ont été officiellement représentés.

Tous les débats, trois services religieux et de nombreuses réunions des spécialistes, ont eu lieu en Esperanto.

Le prochain Congrès aura lieu à Vienne en Août 1924.

**— Abonu al « France-Esperanto » kaj aliĝu al via Grupo, por sisteme propagandi nian lingvon.**

**— Aliĝu al Universala Esperanto-Asocio por praktike uzi ĝin.**

## POST LA NURNBERGA KONGRESO

# Letero
## de S^ro Prezidinto de la XV^a Kongreso

Nürnberg, la 31-an Julio 1923.

Al niaj Francaj kaj Belgaj samideanoj,

Alveninte en la kongresurbo Nürnberg, kie mi verŝajne prezidos nian XV-an Kongreson, mi sentas tion mia devo, esprimi al vi mian vere sinceran, profundan bedaŭron, ke la Kongreso devos okazi sen vi, inter kiuj troviĝas niaj « pioniroj ». Ĉi tiun bedaŭron partoprenas, estu certaj pri tio, ĉiuj germanaj gesamideanoj.

Ni ĉiuj esperis ĝis la lasta momento, ke la politika horizonto pliheliĝos kaj permesos la ĉeestadon de tre multaj el vi. Tiamaniere ni ja plej bone estus povintaj montri per nia komuna laboro al la mondo, kion signifas nia ideo, kion celas nia movado.

La politikaj cirkonstancoj estis pli fortaj ol vi, kiuj vi volonte estus venintaj, kaj ol ni, kiuj ni kun ĝojo kaj amike estus akceptintaj vin en nia lando.

Ni esperu, ke baldaŭ preterpasos tio, kio ankoraŭ malhelpas la neĝenatan samideanan kuneston, kio malhelpas la komunan laboron de niaj nacioj por kulturaj aferoj, nepre necesaj por la homaro. Ni esperu, ke nia movado baldaŭ tiom kreskos kaj ke nia ideo tiel progresos, ke helpe de Esperanto ni povos forigi ĉion, kio kontraŭ nia volo disigas homojn, volonte partoprenontajn komunan laboron.

Dum la kongrestagoj ni ĉiam samideane rememoros vin kaj vian diligentan modelan laboron por nia afero. La fakto, ke ni dum la Kongreso estos disigataj, ne povos malhelpi, ke ni sentas nin interne ligataj.

La L. K. K. en Nürnberg, kiu tutkore konsentas mian leteron, komisiis min, transdoni al vi sian plej koran saluton.

Bonvolu akcepti miajn bondezirojn por via plua poresperanta laboro kaj samideanan saluton.

Prof. DIETTERLE.

Ĉiuj Francaj Esperantistoj legos kun granda kontentiĝo la noblan kaj kortuŝantan leteron de Sinjoro Prezidinto de la XV-a Kongreso kaj dankos lin tutkore pro la altaj sentoj, kiujn li esprimis en ĝi.

Publikigante ĉi supre tiun leteron, mi havas la devon aldoni komentarion.

Kelkaj francaj Esperantistoj, malbone inform-

itaj, kredis erare, ke la neĉeesto de Francoj kaj Belgoj en la XV-a Kongreso, estis kaŭzita de malfavora volo de la Loka Organiza Komitato.

Tiu kredo estas tute malĝusta, kaj, pli bone ol iu ajn, mi povas tion atesti.

Dum la tempo de preparo de la XV-a Kongreso, mi konstante devis korespondadi kun la anoj de la Loka Komitato, kaj per tiu interŝanĝo de leteroj, mi konstatis, ke la Nürnbergaj Samideanoj forte deziris kaj esperis, ke Francoj kaj Belgoj povos ĉeesti en granda nombro la Kongreson.

Kiam la politikaj cirkonstancoj fariĝis pli kaj pli malfavoraj, la Loka Komitato faris multajn klopodojn por ebligi, malgraŭ ĉio, nian ĉeeston, kaj por faciligi la senriskan vojaĝon kaj restadon de Francoj kaj Belgoj.

Nur en la lastaj tempoj, pro la pliakreco de la politikaj interrilatoj, niaj Nürnbergaj Samideanoj konvinkiĝis, ke la ĉeesto de Francoj kaj Belgoj riskus naski tre bedaŭrindajn incidentojn, kies okaziĝo povus grave kompromiti la sukceson de la Kongreso kaj la propagandon de Esperanto en Germanujo.

Ili do devis peti la Francojn kaj Belgojn, ke ili ne venu, kaj ili tion faris kun profunda bedaŭro, kies nova kaj ĝusta esprimo troviĝas en la ĉi-supra letero.

Sed mi uzas tiun okazon por publike kaj solene atesti, ke la anoj de la Loka Komitato de la XV-a Kongreso agis tute lojale kaj samideane kaj ne forgesis la « internan ideon » kaj la superan idealon de nia movado.

Pro tio, je la nomo de la Francaj Esperantistoj, mi tie ĉi esprimas al ili sinceran kaj varman dankon.

GABRIEL CHAVET.

---

# S. F. P. E.

## Réunion du Conseil d'Administration du 16 Juillet 1923

*Convocations.* — Le Président donne lecture d'une lettre de M. Rollet de l'Isle s'excusant de ne pouvoir assister à la séance et demandant que les questions à étudier soient toujours exposées en détail dans la convocation adressée aux membres du C. A. Le Conseil estime qu'il n'y a pas lieu de fournir des explications détaillées sur l'ordre du jour à ceux de ses membres qui habitent à Paris ou en banlieue, mais qu'il faudra les fournir dans la mesure du possible aux membres de province qui pourront, soit se faire représenter par un Collègue, soit exprimer leur avis par lettre adressée au Président.

*Congrès de Nürnberg.* — Le Président a reçu du « Loka Kongresa Komitato » de Nürnberg une « déclaration officielle » portant qu'en raison de la crise politique actuelle, « il ne peut absolument pas garantir aux congressistes français et belges l'absence de désagréments pendant leur voyage et leur séjour, et que, pour éviter toutes complications, il doit conseiller absolument de ne laisser paraître en aucune manière leur nationalité. »

Des congressistes français ne pourraient donc « en aucune manière » représenter la S. F. P. E. La déclaration ajoute qu'il ne peut être question pour Français et Belges d'être logés à l'hôtel, mais seulement chez des particuliers, s'il en est qui y consentent. Dans ces conditions, le Conseil décide de demander à M. Ed. Privat de vouloir bien le représenter à Nürnberg.

*Commissions.* — Le Conseil décide de reconstituer sans délai les principales Commissions de la S. F. P. E. Celle de la Presse étant déjà rétablie sous la présidence de M. Archdeacon (51, rue de Clichy, Paris-9e), il reste à reconstituer celle de la Propagande et celle de l'Enseignement.

Pour la *Commission de la Propagande,* le Secrétaire ayant obtenu l'acceptation des intéressés, il est entendu qu'elle comprendra désormais un minimum de sept membres ayant chacun une mission nettement spécialisée et des pouvoirs propres :

1. Propagande auprès des Pouvoirs publics et des membres du Parlement : le Président de la S. F. P. E., président de droit de la Commission.
2. Propagande dans l'Université : M. Muffang, 7, rue du Fresne, à Angers (Maine-et-Loire).
3. Propagande dans les milieux industriels et commerciaux et auprès des Chambres de Commerce, Expositions circulantes : Société « *Esperanto et Commerce* » (M. Marcel Dény, 20, rue de l'Arc-de-Triomphe, Paris-17e).
4. Création de fédérations et de groupes : M. Petit, 59, rue de Neuilly à Rosny-sous-Bois (Seine).
5. Organisation des Conférences et liste des Conférenciers : M. Nels, 20, rue Tholozé, Paris-18e.
6. Rédaction et édition des brochures, tracts et affiches de propagande : M. Warnier, 18, rue Singer, Paris-16e.
7. Répartition, et vente aux groupes, des brochures, tracts et affiches de propagande : M. Bobin, 21, rue Vital, Paris-16e.

Les fédérations régionales ou les groupes isolés devront donc, dès maintenant, s'adresser directement à chacun des membres de la C. D. P., pour ce qui concerne sa spécialité.

— La Commission de l'Enseignement est reconstituée sous la présidence de M. Decourt, 41, rue de Paris, à Vanves (Seine), qui ne se chargera de ses nouvelles fonctions qu'à partir du 1er Octobre prochain.

*Brochures de Propagande.* — Le Conseil décide l'achat de 500 exemplaires de la brochure de propagande éditée par la Chambre de Commerce italienne pour la Suisse et donnant un compte-rendu complet (56 pages) des débats de la Conférence de Venise. Cette brochure sera cédée aux groupes à prix coûtant, soit à 0 fr. 50 l'exemplaire.

*Adhésions.* — Le Conseil décide d'adresser à tous les groupes français demeurés en sommeil depuis la guerre, et à ceux qui ont négligé en 1923 d'envoyer leur cotisation à la S. F. P. E., une circulaire leur signalant les nouveaux statuts nationaux, l'intérêt considérable qu'il y a pour notre mouvement à ce qu'ils rallient leur Fédération régionale et la S. F. P. E., et leur demandant d'envoyer dès maintenant leur adhésion pour 1924. Il remercie vivement MM. Vanverts et Deligny pour les efforts qu'ils font en vue de reconstituer

la Fédération du Nord et MM. Beaumel et Marly pour la propagande qu'ils ont entreprise en vue de reconstituer la Fédération du Midi.

M. Peltier, président de la Fédération du Nord-Est, fait connaître que cette Fédération adhère avec joie à la S. F. P. E. aujourd'hui reconstituée sur des bases solides.

M. Beck, président de la Fédération Méditerranéenne, fait savoir qu'il va demander à son Comité fédéral de voter sans tarder l'adhésion globale à la S. F. P. E.

*Le Secrétaire général :* J. COUTEAUX.

# Franca Kroniko

*Mallongigoj :* E., Esperanto ; Prez., Prezidanto ; Sekr., Sekretario ; S-ro, Sinjoro ; S-ino, Sinjorino ; F-ino, Fraŭlino ; gr., grupo ; feder., federacio ; sam., samideano ; prof., profesoro.

Ni bezonas la helpon de ĉiuj francaj sam. por kunlaborado en ĉi-tiu rubriko.

**Esperanto kaj Komerco.** — Ĉi tiu Asocio, kies celo estas la disvolvo de komercaj rilatoj inter Francujo kaj eksterlando per E., havis sian fondan kunvenon la 6 Julio. Post parolado de S-ro A. Baudet, estis elektita komitato el : S-roj D-ro Nuyts, direktoro de Societo de Dentbrosoj *« Dentclair »* (prez.) ; Gourlay, ĉefredaktoro de *Le Cuir* (vicprez.) ; Dény, inĝeniero diplomita de la Centra Lernejo (sekr.) ; Balliman, Bobin, Boulnois, Delanoue (kasisto) ; Dény, Dupuis, Estour, Rousseau, Warnier kaj F-ino Sanua, direktorino de la Lernejo de Supera Komerca Instruado por fraŭlinoj. Adreso : S-ro M. Dény, 20, rue de l'Arc de Triomphe, Paris. Ke ĉiu sam. incitu gravajn komercistojn aliĝi al tiu Asocio, kiu jam enhavas inter siaj anoj 6 membrojn de la Pariza Komerca Ĉambro kaj prezidantoj de kelkaj gravaj komercaj sindikatoj.

**Annecy.** — En la kunveno de 4 Julio de la Florimontana Akademio, la prez. S-ro Miquet, legis raporton pri E., verkitan de sam. Laignier kaj favore akceptitan.

**Beauvais.** — La Komerca ĉambro voĉdonis al la gr., prezidata de la nelacigebla S-ro Demarcy, subvencion de 50 fr.

**Bordeaux.** — Dum la kongreso de la grava Franca Asocio por la progresado de la Scienco, en aŭg., tri raportoj, favore akceptitaj, estis reprezentitaj al la subsekcio de lingvoscienco : « E. kaj la internacia scienca koopero » de Rollet de l'Isle, « E. komerca kodo » de A. Baudet, « Kial la Kongreso povos interesiĝi al E. » de Moissenet. La loka gr. organizis la 1-an Aŭg., en la ejo de la Agrikultura Societo, paroladon de Rollet de l'Isle kaj de Marly por la kongresanoj. Ĝin ĉeestis la prez. de la Kongreso, S-ro Desgrez kaj la prez. de la lingvo-scienca subsekcio Depoin.

**Chalon-sur-Saône.** — La 29 Jul. membroj de gr. de Chalon kaj Le Creusot kunvenis kun la standardo, por ceremonio de surmeto de marmora tabulo je la tombejoj de sam. Bord, eksprez. de la Federacio de Bourgogne kaj Decouches, prez. de la gr. de Creusot en Lalheue. Parolis S-ro Richard-Millet kaj D-ro Diard. Estas la unua publika manifestado de la feder., tiel vigla antaŭ la milito kaj nun rekomencinta la laboron.

**Dijon.** — D-ro Diard, eksprez. de la gr. en Le Creusot, nun loĝas tie ĉi kaj komencis propagandon kun S-ino Petit.

**Juvisy** (Seine). — La 29 Julio, post parolado de sam. Lespicier, fondiĝis gr., dank' al la agado de S-ro Picy.

**Le Vans** (Ardèche). — Dum lia somera ĉeesto en ĉi tiu malgranda urbo, S-ro G. Chavet faris paroladon en la urbdomo la 15 Aŭgusto.

**Mâcon.** — La 23 Jun., en Kongreso de sciencaj societoj de Bourgogne, raporto pri E. estis prezentita de ĉefinĝeniero Moissenet.

**Marseille.** — Vigla propagando inter doganoficistoj de sam. Bonnayre, doganrevizisto. Dank' al li la Komitato de la Sindikato de doganistoj en Julio rekomendis E.

**Montmorency.** — La gr. estas oficiale enregistrita. La prez. S-ro Aumaître.

**Paris.** — Dum la somero la Centra Oficejo havis vizitojn de multaj fremdlandaj kaj francaj sam., inter kiuj S-roj Drummond, prez. de l' Aŭstralia E. Asocio ; Allen, profesoro de franca literaturo en la Universitato de Toronto.

— La 11 Junio, dum bankedo de lernintoj de la Politeknika Lernejo, nia sam. Kolonelo Fillioux, nun teknika direktoro de « Corderies de la Seine », parolis pri E.

— La 18 Aŭg. okazis la jara bankedo de la « Verda Kato », kiun partoprenis 20 personoj.

— Aliĝis al la deziresprimo por E. jenaj membroj de la Scienca Akademio : Prof. Emile Borel, mara inĝeniero Lanbeuf, kaj S-roj Jean Perrin kaj Schlvesing. Entute, estas 34 subskribintoj.

**Perpignan.** — Dum la somero la gr. organizis kelkajn sukcesajn promenadojn kaj, malgraŭ la varmeco, la kursoj funkciis en la Laborborso. La 7 Okt. okazos departamenta kongreso, pri kiu ni raportos aparte.

**Rochefort-sur-Mer.** — Ĉi tie loĝas nun nia fervora sam., leŭtenanto Sayous, antaŭe en Dahomeo.

**Strasbourg.** — Sukcesa parolado de advokato Géraud la 16 Jun. La gr. ricevis de Generalo Bastien, L. K., nun en Lille, donacon de 200 fr. — Sur la ponto de Kehl, sam. Schwartz organizis E. informejon. — La 14 Jul. okazis ekskurso de gr. de Strasbourg kaj Mulhouse al Colmar.

Pour l'expansion commerciale de la France, nous avons le devoir de ne rien négliger... même l'esperanto.

A. BAUDET, membre de la Chambre de Commerce de Paris, *Liberté* (30 Juin 1923).

## Tra la Esperanta Mondo

**Naskiĝo.** — Al nia sam. Salzmann, en Lyon, naskiĝis la 20-an de Junio filo Maks.

**Rekompenco.** — D-ro Bergonié, profesoro en la Medicina Fakultato de la Universitato de Bordeaux, membro de la Scienca Akademio, malnova amiko de nia movado, honora prez. de la gr. de Bordeaux, ricevis grandan krucon de la Honora Legio.

## NIAJ EĤOJ

### La tertremo en Japanujo

Granda malfeliĉo trafis Japanujon. Sufiĉis unu tago de kolero de la naturo por detrui la laboron de jardekoj, mortigi dekojn da miloj de personoj, senigi de ĉio kelkajn centojn da aliaj, ruinigi kelkajn urbojn, kaj montri, ke malgraŭ ĉiuj progresoj de la tekniko, ekzistas ankoraŭ fortoj, antaŭ kiuj la homo estas senpova.

Ĉiuj el ni konas Japanujon, priskribatan de la poetoj : landon de la ĉerizarboj, de miniaturaj ĝardenoj, de neĝaj montoj kaj de tradicioj. Ofte, legante *La Revuon Orientan* kiu, kun *La Verda Utopio,* malkovris al ni tiom da interesaj flankoj de la japana vivo, ni estis agrable surprizitaj de la ĉarmeco, eleganteco kaj poezio de la plej ordinaraj priskriboj. Ni ĉerpas ekzemple jenan pri propaganda vojaĝo : « Ĉe la stacio min renkontis tri instruistoj ; ili venis bicikle kaj ni piede tra monto iris 10 kilometrojn ĝis la gastamo domo de l' mastro. La familio kun lanternoj (ni alvenis je la 8-a vespere) renkontis nin ĉe l' pordego, ĝentile bonvenigante min. Baldaŭ venis kelkaj vilaĝanaj junuloj, membroj de Seinen-dan. Ni agrable pasigis la vesperon, bonege manĝante kaj per biero toastante. Sekvanttage dimanĉe ni vizitis, laŭ mia deziro, japanajn vilaĝajn pastrojn budaistajn, kiuj varme akceptis nin kaj montris templon, pastrajn vestojn, tombejon kaj donacis al mi preĝlibron ! »

Kaj jen alia priskribo :

« Longa vintro, nin esp. de la nordo dormigis. Sed jam Majo forrabis neĝon for de *nupri* (monto) ĝin anstataŭis per floroj. En Aprilo ni jam faris publikan paroladon. »

Sed apud la poezio estas la realeco. En la lasta duonjarcento kreskis moderna lando kun komerco, industrio, fervojoj, elektro, lando laborema kaj energia. Ĉar ĝi pli kaj pli serĉis proksimiĝi al la Okcidenteŭropa Civilizacio, la esp. movado tie estis tiel agema.

Ni pro tio ne dubas, ke malgraŭ la grandaj doloroj, la lando ree rekonstruiĝos, dank' al la senlaca laboro de la japana popolo.

Ni prezentas al niaj japanaj sam. niajn plej sincerajn kondolencojn kaj estas pretaj helpi laŭpove al la revekiĝo de nia movado en Japanujo, post kiam la normala vivo renaskiĝos.

**La proksima Oktobra-Novembra numero aperos la 5-an de Novembro.**

## Le Mouvement Espérantiste à l'Etranger

**La Société des Nations.** — La presse a publié le 2 Août un communiqué de la S. d. N. annonçant que la Commission de Coopération Intellectuelle a décidé « de ne pas recommander une langue artificielle à l'attention de la S. d. N., estimant que ses efforts doivent tendre avant tout à favoriser l'étude des langues vivantes et de la littérature étrangère. » Cette résolution, proposée par MM. Bergson, de l'Académie Française et M. Luchaire, Inspecteur général au Ministère de l'Instruction Publique, fut la seule qui n'ait pas été acceptée par l'Assemblée générale de la Société des Nations. Un assez grand nombre de délégués dont lord Robert Cecil, ont trouvé cette résolution inopportune, étant donné les grands progrès accomplis par l'Esperanto depuis l'année dernière. Ainsi, par exemple, au Brésil, dont le délégué avait dénigré l'Esperanto à l'avant-dernière assemblée, le Parlement vient de voter une loi instituant des examens d'Esperanto dans toutes les écoles normales. En présence de cette opposition, le rapporteur a dû retirer la résolution et c'est ainsi que l'Esperanto a pris sa revanche sur le point de vue de la Commission de coopération intellectuelle.

**Bulgarie.** — Le X[e] Congrès national a eu lieu à Tirnovo, en présence du Ministre de l'Instruction Publique. Parmi les espérantistes étrangers, invités au Congrès, signalons le sénateur roumain Balaŝ. — Le Ministère du Commerce a envoyé aux Chambres de Commerce une circulaire leur recommandant le compte-rendu de la Conférence de Venise pour la publication duquel la Chambre de Commerce de Sofia a accordé une subvention de 1.000 leva. — Le Ministre de la Guerre a autorisé aux officiers de porter l'insigne espérantiste.

**Lettonie.** — Le catalogue officiel de la 3[e] Foire de Riga contient une préface en Esperanto.

**Roumanie.** — Le III[e] Congrès national a eu lieu à Timŝoara, sous le haut patronage du Prince-Héritier et des Ministres de l'Instruction Publique et des Cultes et sous la présidence effective du Général Galvanescul, qui a fait un discours en Esperanto.

**Pologne.** — Le 3[e] Congrès de l'Association du Personnel des P. T. T. a émis un vœu en faveur de l'Esp. et a décidé l'achat de 5.000 manuels pour les répandre parmi ses membres.

## Nia Gazetaro

Dum la du lastaj monatoj ni ricevis kelkajn novajn gazetojn. Niaj legantoj juĝos mem ĉu ĉiuj ili estas necesaj al nia movado :

— *Esperantio,* 8-paĝa kun ilustraĵoj, « pri la stato de internacia arta kaj socia vivo ». Abonprezo por 10 N-roj : 5 fr. — Adr. S-ro P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18 (Germanujo).

— *La Lumturo,* dusemajna politika gazeto tutmonda por la interesoj de la homoj, 20-paĝa. La n-ro 1 traktas precipe pri Germanujo. Adr. : Handelsgesellschaft « Continental », m. b. H., Bremen (Germanujo), Langenstr. 60.

## NEKROLOGO

— Oni sciigas al ni pri la morto de S-ino **C. Bourlet**, vidvino de la eminenta profesoro, kaj de la tre agema prezidanto de la Parisa Grupo. De post la morto de sia edzo, subite okazinta en 1913, S-ino C. Bourlet, kies sano estis jam ŝanceliĝanta, iom post iom malfortiĝis. La suda klimato, pli milda, ne revigligis en ŝi la eksvenantajn fortojn, kaj ŝi mortis en *Vence* (Alpes-Maritimes) la lastan tagon de Aŭgusto. Ĉiuj gesamideanoj, kiuj konatiĝis kun ŝi antaŭ la milito, ĉu ĉe ĉiu monata vespermanĝo de la Parisa Grupo, ĉu dum la kongresoj, kiujn ŝi ĉeestis kun sia edzo, ekscios bedaŭre pri la morto de tiu afabla virino, kies nomo restas intime kunligata kun la unuaj progresoj de Esperanto en Francujo.

Al la gefiloj de S-ino C. Bourlet *France-Esperanto* sendas la esprimon de siaj sinceraj kondolencoj.

— Kolonelo **Pollen**, la unua kaj longjara prez. de Brita E. Asocio, mortinta akcidente je la aĝo de 75 jaroj, la 18 Junio, en la insulo Manx. Li havis brilan karieron en Indujo, kiel regionestro, estis unu el la « Trio por la Tria », senlaca propagandisto kaj bona lingvisto.

— S-ino **Dru**, malnova Parisa sam., la 21 Julion.

— S-ro Richard **Sharpe**, bonstila verkisto, aŭtoro de « Travivaĵoj de Ro-Ŝo » kaj aliaj verkoj, je la aĝo de 79 jaroj.

# En « Verda Kato »

Por fini la teatran « sezonon » Verda Kato, al sia programo ĉiam fidela, ludis por la unua fojo, duaktan opereton « La Ramolidoj », de S-roj D. Eyquem kaj F. de Ménil, absolute originalan laŭ la teksto kaj la muziko. Jes : en la aktoraro de V. K. sin trovis sopranineto, kontraldino, tenoreto, baso kaj komika kantisto. Tio sufiĉis, kaj la sukceso estis granda.

« La Ramolidoj », kies temo ŝajnas iom malpruda, sed delikate klarigita, estis sprite kaj vigle ludita de F-inoj Marga Rineta kaj Ilona Roswadowska, de S-roj Le Cornec, Dubois kaj Gabory. Ili tre lerte kantis la melodiplenan partitureton, kiun sur la fortepiano akompanis S-ino de Ménil. Oni precipe aplaŭdis la uverturon, la arieton de Timianino (Marga Rineta), la segvediljon de Malvina (T. Roswadowska), la Kanto de l' Signo (Le Cornec, tre rimarkinda Kolonelo Ramolo). La dueto, inter Timianino kaj Leŭtenanto Petro (R. Dubois), la geamantoj de la komedieto, estis aplaŭde revokita ĉe la fino de la unua akto. Ne forgesu S-ron P. Gabory, kiu tre komike ludis la rolon de araba soldato ĉiam ebria.

Plezure ni atentigas la samideanaron pri tiu nova montro de la taŭgeco de Esperanto en ĉiuj teatraj kaj muzikaj fakoj.

# A travers la Presse

**L'Esperanto et la T. S. F.** — *Radio-Amateurs*, revue générale de l'Industrie et du Commerce de la T. S. F. (201, boulev. Malesherbes, Paris-17e) dont nous ne saurions ne pas recommander la lecture à nos abonnés, a publié, dans son numéro de Juillet, plusieurs réponses reçues à son référendum sur l'E. et la T. S. F., dont nous reproduisons avec plaisir quelques extraits :

... Que quelques postes d'émission consacrent deux ou trois fois par semaine un quart d'heure à des cours d'Esperanto et un grand service sera ainsi rendu à l'humanité. (Dr J. A. Martinie, ancien médecin de la Maison Royale de Siam.)

... Dans une page de votre revue, vous parlez de la propagande française par T. S. F. Parfait, mais en quelle langue ? En Français ? Vous prêcherez des convertis. Alors, dans quelle ou plutôt quelles langues européennes ? C'est impraticable. Toute sélection faite serait défavorable à nous-mêmes. L'Esperanto s'impose. (M. Girardet, Paris).

**Un livre de Nitti en Esperanto.** — Une maison d'édition à Francfort prépare actuellement la publication en Esperanto du livre germanophile de l'ancien président du Conseil italien, M. Nitti : « L'Europe sans la paix », déjà traduit en plusieurs langues, avec une préface spéciale de l'auteur. Ceci prouve que l'Esperanto est un moyen d'expansion que les services de la propagande française auraient tort de négliger.

(*La Presse Associée* du 4 Septembre.)

# El la Franca Gazetaro

*Mallongigoj :* ĉs., ĉiusemajna ; ĉm., ĉiumonata ; duonm., duonmonata. La ĉiutagaj gazetoj havas nenian mallongigon.

Pro manko de loko estas al ni neeble citi ĉiujn gazetojn, represintajn la komunikojn de la Gazetara Komisiono de la S. F. P. E. pri la germana propagando per E. kaj pri la Nurnberga Kongreso. Al ĉiuj sendintoj ni esprimas nian sinceran dankon kaj gratulojn pro la bone sukcesintaj klopodoj.

**Parisa :** *X Information*, ĉm organo de la lernintoj de la Politeknika Lernejo : (junio), longa tre dokumentita art. por E. de nia nelacigebla sam., ĉefinĝeniero Moissenet ; (julio), kritikoj de prof. Sabatier, membro de la Scienca Akademio. — *La Liberté* (30 junio), E. komerca kodo, de S-ro A. Baudet. — *France-Monde*, ĉm (aŭg.), Kroniko de S-ro Moissenet. — *Ere Nouvelle* (8 kaj 20 aŭg., 6 sept.) E. rubriko. — *Le Cuir*, ĉm (aŭg.), « Por plifaciligi internaciajn komercajn rilatojn », ĉt (28 aŭg.), eldono de libro de Nitti en E — *Le Droit des Femmes*, ĉm (jun.), E. kaj la Ruĝa Kruco.

**Une opinion curieuse.** — « Las y combien serait meilleur qu'il y eust au monde un seul langage naturel, que d'employer tant d'années pour apprendre de motz : et ce jusques à l'aage bien souvent que nous n'aivons plus ny le moyen, ny le loisir de vaquer à plus grandes choses. »

Joachim du Bellay, *Défense et illustration de la langue française* (1525-1560).

**Provinca :** *La Région du Centre* (aŭg.), oficiala organo de la XVII-a ekonomia regiono en Clermont-Ferrand, Internacia komerca lingvo, de S-ro Génermont. — *L'Action Syndicaliste*, ĉm (aŭg.), Perpignan, pri la gramatiko de E. — *Petit Niçois* (9 julio), detala art. pri praktika uzo de E., de S-ro Jubleau. — *La République de l'Oise* (jun.) Beauvais, letero de S-ro Demarcy pri germana propagando per E.

## Tribune des Groupes

**La Fédération du Centre-Ouest** comprend les départements suivants : Loiret, Yonne, Nièvre, Cher, Indre, Loire-et-Cher, Indre-et-Loire, Sarthe, Mayenne, Maine-et-Loire.

**Groupe de Rosny-Neuilly.** — Grand concert annuel le 18 novembre à 14 h. 30.

**Fédération de la Région Parisienne.** — Réunion du Conseil Fédéral le 7 octobre, 51, rue de Clichy. Ordre du jour très important.

**Arcueil.** — Fête annuelle le 21 Octobre, à 14 heures, 2, rue des Ecoles. Entrée : 1 fr. 50. Tramway : Porte d'Orléans-Antony, descendre à la Croix d'Arcueil.

## BIBLIOGRAFIO

**Oficiala Jarlibro de U. E. A.** por 1923, 12, bd du Théâtre, Genève. 230 p. kun aldono de listo de korespondantoj.

Pri ĉi tiu ampleksa volumo kun riĉa informa materialo prave skribis franca teknika revuo *L'Index des Industries du Cuir,* ke ĝi estas « palpebla kaj vere impresa pruvo pri la granda disvolviĝo de la lingvo E. »

**Litova Almanako,** 248 paĝoj, eldono de Litova E. Asocio, Kaunas, D. Vilniaus g. 34. - Prezo : 3,50 sv. frankoj.

Jen libro leginda kaj bele prezentita. Ĝi estas antologio de Litovujo, lando preskaŭ nekonata eksterlande. Diversaj artikoloj pritraktas la litovan civilizacion, arton, lernejon, k.t.p. Citinda ankaŭ estas la art. de Prof. Ŝaulkausis pri la vera patriotismo. La stilo estas bona kaj ni vidas la zorgan redaktadon de sam. Maĉernis kaj de nia malnova pioniro, abato Dombrowski. Legante ĝin, oni ĉerpas fonton de interesaj sciigoj. Jen imitinda ekzemplo por diskonigi per E. malgrandan popolon.

*Ĵus aperis*

# JARLIBRO

DE LA

LINGVA KOMITATO kaj de ĝia AKADEMIO

DE TH. CART

*necesa al ĉiu samideano*


(16 paĝoj kun kovrilo)

Prezo kun afranko : **1** fr. **10**, antaŭpagota.

CENTRA ESPERANTISTA OFICEJO

51, Rue de Clichy — Paris-9e

**TOUS COMPTES AUTOMATIQUEMENT & A JOUR :** Fournisseurs, clients, représentants, assurés, fisc, etc. Méth. inéd. simple c. env. préalable **3** fr. **25**. Sentourens, 32, r. Chay-Farines, Bordeaux.



**Kiu diras**

**"Roussillon"**

**diras supera vino**


**220 litroj por 310 francaj fr.**

kun pagitaj sendkostoj, impostoj kaj la barelo.

Skribu : **BOLTE-TRILLES,** viticulteur

Thuir (Pyrénées-Orientales)

**La Franca Skribmaŝino M. A. P. mirinde taŭgas por Esperanto**




dank' al ĝia klavo « **Mallongigo** »

**J. PION,** **Ĝenerala Agento**

**10, Place du Châtelet - CHALON-s/S.**

KOPIOJ, CIRKULEROJ KAJ ĈIUJ OFICEJAĴOJ

MEBLOJ KAJ MONŜRANKOJ

*Agentoj petataj*

IMP. J. SOLSONA, 9, Rue Hallé, Paris (14e) — Tél. : Gobelins 62-71 *L'Administrateur-Gérant :* F. DE MÉNIL.

# GROUPES ESPÉRANTISTES FRANÇAIS RECONSTITUÉS OU EN FORMATION

*Société Française pour la Propagation de l'Esperanto* (25 groupes). — Prés. M. Eyquem, 1, rue Gay-Lussac, Paris (5e). Secr. M. Couteaux, 3, av. du Clocher, Aulnay-sous-Bois (S.-&-O.).

*Groupe Espérantiste du Touring-Club de France.* — Prés. M. le Colonel Renard. Secr. M. E. Archdeacon, 77, rue de Prony, Paris (9e).

*L'Association Espérantiste du Personnel des P. T. T. de France et des Colonies.* — Prés. M. Michelis di Rienzi, 20, avenue Reille, Paris (14e). Secr. M. Parrant, 25, rue Jean-Danjou.

*L'Association Esp. Ouvrière de langue française.* — 120, rue Lafayette, Paris.

FÉDÉRATIONS : *Région Parisienne,* 51, rue de Clichy, Paris. — *Centre-Ouest,* secr. M. Prochasson, 67, r. de Patay, Orléans. — *Nord-Est,* secr. M. Peltier, 4, r. Trianon, Reims. — *Est,* 17, rue de l'Ail, Strasbourg. — *Bourgogne,* secr. M. Fontaine, 60, r. du Maréchal-Foch, Le Creusot. — *Région Méditeranéenne,* 143, cours Joseph-Thierry, Marseille.

*Alpes-Maritimes.* — **Cannes**. Secr. M. Cresp, 14, rue des Marchés.
**Grasse**. Secr. M. Bouge, pharmacien.
**Nice**. Secr. M. M. Roncati, 23, rue Lepante.
*Aube.* — **Troyes**. Secr. M. Beuve, instituteur, Cours Jacquin. Groupe ouvrier, Secr. M. Hugot-Raison, Bourse du Travail.
*Bas-Rhin.* — **Strasbourg**. Secr. M. Schwartz, 15, rue du Maréchal-Foch.
*Bouches-du-Rhône.* — **Marseille**. Secr. Mlle Roksano, Esperantista Oficejo, 43, Cours Joseph-Thierry.
Fédération Méditerranéenne, même adresse.
Groupe ouvrier, Bourse du Travail.
*Charente.* — **Cognac**. Secr. M. L. Laval, 37, rue de l'Egalité.
**Saintes**. Secr. M. Barbier, 15 *bis,* rue de l'Aire.
*Corrèze.* — **Tulle**. Secr. M. F. Soubianne, 87, rue de la Barrière.
*Doubs.* — **Besançon**. Café du Cercle du Travail, 14, square Saint-Amour.
*Dordogne.* — **Périgueux**. Secr. M. Moniotte, 8, rue des Tabacs.
*Doubs.* — **Besançon**. Café du Cercle du Travail, square Saint-Amond.
*Eure-et-Loir.* — **Chartres**. Secr. M. Souazay, 13, rue du Petit-Beauvais.
*Finistère.* — **Brest**. Secr. M. Nicolas, 8, rue du Chemin de fer.
*Gard.* — **Alais**. Secr. M. Fernand Laval, 181, Grande-Rue.
**Aramon**. Secr. M. Charles Raffin.
*Gironde.* — **Bordeaux**. Secr. M. Marly, 11, rue Baysellance.
*Haute-Garonne.* — **Toulouse**. Secr. M. Baumel, 5, r. des Lois.
**Montréjeau**. Secr. M. Donès, 17, r. Barry.
*Haut-Rhin.* — **Mulhouse**. Secr. M. Rudler.
*Haute-Savoie.* — **Annecy**. Secr. M. Dannemuller, 14, rue Royale.
**La Roche**. Prés. M. Coudray, instituteur.
*Hte-Vienne.* — **Limoges**. Prés. M. L. Lamant, 28, Bd Carnot.
*Hérault.* — **Montpellier**. Secr. M. A. Rivière, 22, r. Lamartine.
**Béziers**. Secr. M. Flottes, 23, rue Meyerber.
**Cette**. « Sunradio ». Secr. M. Guibal, cité Doumet, maison Meynier.
*Isère.* — **Grenoble**. Secr. M. Ploussu, 4, place J.-Achard.
**La Mure**. Secr. M. Caillet, Ecole Primaire Supérieure.
**Vienne**. Trés. M. Moussier, 168, rue d'Avignon.
*Jura.* — **Lons-le-Saulnier**. Secr. M. Grillon, 8, rue Sébile.
**St-Claude**. Secr. M. Karl, 38, rue du Pré.
*Loire.* — **St-Etienne**. Secr. M. E. Gabert, 8, r. du Prés. Wilson. Groupe ouvrier, Secr. M. Guichard, 4, rue Dervieux.
**Rive-de-Gier**. Secr. M. Th. Jacob, 6, rue César-Berthoron.
**Roanne**. Secr. M. L. Maillet, 28, rue du Commerce.
**Firminy**. Secr. M. Caleyron, 28, rue Sadi-Carnot.
Groupe ouvrier, Secr. M. Testud, 30, rue de la Loire.
*Loiret.* — **Orléans**. Secr. M. R. Leroy, 10, rue Tous-les-Saints. Groupe ouvrier, Secr. M. L'Heritier, 22, rue Notre-Dame de Recouvrance.
**Montargis**. M. Hiroux, 97, rue du Loing.
*Loire-Inférieure.* — **Nantes**. Secr. M. le Dr Saquet, 22, rue du Calvaire.
*Maine-et-Loire.* — **Angers**. Secr. M. Muffang, 7, rue du Fresne.
**Cholet**. Prés. M. E. Boisson, 37, rue Nationale.
*Marne.* — **Reims**. Prés. M. R. Peltier, 4, rue Trianon.
*Mayenne.* — **Laval**. Secr. M. F. Chauveau, 35, rue des Fossés.
*Meuse.* — **Verdun**. Secr. M. Lefebvre, villa Chanonin, Côte Saint-Barthélemy.
*Meurthe-et-Moselle.* — **Nancy**. M. Esselin, conseiller à la Préfecture.
*Moselle.* — **Metz**. Secr. M. Barban, 3, rue de Nancy.
*Nièvre.* — **Cosne**. Secr. Mlle Monsinjon, institutrice.
*Nord.* — **Lille**. Prés. M. le Dr Vanverts, 236, rue Solférino.
**Roubaix**. Secr. M. Lamère-Bayart, 254, rue Pierre de Roubaix.
*Oise.* — **Beauvais**. Prés. M. Demarcy, 18, rue Sadi-Carnot.
*Pas-de-Calais.* — **Calais**. M. Perrin, 20, rue du Pont-Neuf.
**St-Omer**. Secr. M. Deligny, 4, rue Allent.
*Puy-de-Dôme.* — **Clermont-Ferrand**. Secr. M. Thomas, 68, boulevard Boissejour.
*Pyrénées-Orientales.* — **Perpignan**. Secr. M. Llech, 5, rue la Savonnerie.
*Rhône.* — **Lyon**. Secr. M. Sandelyon, 30, rue Ferrandière.
Groupe Espérantiste Ouvrier, 6, rue Paul-Bert.
Amicale Espérantiste. Secr. M. G. Pouchot, 7, rue de la Martinière.
**Tarare**. Secr. M. E. Cherblanc, 1, place de la Madeleine.
**Villeurbanne**. Groupe ouvrier. 52, rue du 4 Août.
*Saône.* — **Châlons-sur-Saône**. M. Richard-Millet, 7, place de Beaune.
*Saône-et-Loire.* — **Le Creusot**. Secr. M. Rosset, 5, rue de Charolles.
*Sarthe.* — **Le Mans**. Prés. M. Le Bihan, 15, rue de Flore.
*Seine.* — **Alfort**. Secr. M. Paul Benoit, 19, rue Paul Bert.
**Arcueil**. M. Mathis, 5, rue Raspail.
**Bourg-la-Reine**. Secr. M. Burg, 12, avenue Galvis.
**Colombes**. Secr. M. Bontemps, 4, villa des Cerises.
**Levallois-Perret**. Prés. M. C. Rousseau, 4, place de la République.
**Neuilly-Plaisance**. M. Joffroy, 7, Villa de l'Ermitage, rue du Côteau.
**Noisy-le-Sec**. Secr. M. Page, 22, av. Victor-Hugo.
**Pantin**. Secr. M. L. Rafray, 15, rue Magenta.
**Paris**. Groupe. Secr. M. R. Dubois, 4, rue du Loing.
Section du XVe. Mme Prévost, 75, rue Violet.
Section Paris-Nord. M. Merluc, 51, rue Sedain.
Groupe de jeunes filles « Juneco ». Sec. Mlle Suzanne Bécuwe, 127, boulevard Voltaire.
« Verda Kato ». Secr. Mlle Marga Rineta, 7, rue N.-D. de Bonne-Nouvelle.
Comité du patronage maçonnique. Secr. M. Méras, 11, rue Poussin.
**Puteaux**. Secr. M. Saint Rémy, 52, rue Eugène Eichenberger.
**Rosny-s.-Bois**. Secr. M. L. G. Monnot, 36, rue Paul-Cavaré.
**St-Denis**. Secr. M. Galy, 40, cours Ragot.
**St-Maur**. Mlle Lique, 22, rue Albert I, La Varenne.
**St Ouen**. Secr. M. Godard, 16, avenue des Batignolles.
**Vanves (Malakoff et Issy)**. M. Marchand, 49, avenue de Verdun, Issy-les-Moulineaux.
**Villejuif**. Secr. M. Cozic, 38, avenue des Ecoles.
**Villemonble**. (Voir Le Raincy Seine-et-Oise).
*Seine-et-Oise.* — **Athis-Mons**. Secr. M. R. Picy, 61, r. de Juvisy.
**Aulnay-sous-Bois**. Secr. Mme Berthoux, 19, av. Lelièvre.
**Le Raincy**. Secr. M. E. Robert, 4, allée des Fougères.
**Montmorency**. Secr. M. V. Duval, 4, rue St-Jacques.
**Neuilly-Plaisance**. (Voir Rosny-sous-Bois : Seine).
**Rueil**. Secr. M. A. Cligny, 10, rue des Bois.
**Versailles**. Secr. M. Chilard, 4, rue Pierre-Bertin.
**Villeneuve-St-Georges**. Secr. M. Lespicier, 7, r. Emile-Zola.
**Yerres**. Prés. M. Dumont, instituteur.
*Seine-et-Marne.* — **Melun**. Secr. M. Perrin, 38, rue St-Aspais.
**Meaux**. Prés. M. Binsfeld. 8, rue Notre-Dame.
**Nemours**. Secr. M. Duclos, 63, rue de Paris.
*Seine-Inférieure.* — **Le Hâvre**. Groupe ouvrier, Secr. M. Leroux, instituteur, Ecole Graville-Centre.
*Somme.* — **Amiens**. Secr. M. L. Moitié, 26, rue de Dijon.
*Tarn.* — **Gaillac**. Prés. M. G. Roy, prof. au Collège.
*Var.* — **Toulon**. Secr. M. Berenguier, avenue de Claret, villa Train.
*Vaucluse.* — **Vaison**. Secr. M. Maurice Blanc.

## *COLONIES FRANÇAISES*

*Algérie.* — **Alger**. Prés. Mme Mantoz, 38, rue Hoche.
**Constantine**. Secr. M. Cognet, 5, boulevard Victor-Hugo.
*Maroc Oc.* — **Marrakesh**. Groupe de la Légion Etrangère. Secr. M. Vegoff, 11671, 4e Rég. Etr., 1er Bat., 3e Cie.

*(Prière d'indiquer les changements.)*

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL